

La Progreso

REDACTIE-
COMITÉ

G. P. DE BRUIN
G. J. DEGENKAMP
F. FAULHABER

**STUDIEBLAD VAN DE FEDERATIE
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN**

IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL

f 1.75 per jaar; f 1.25 voor leden van F.L.E.

Postgiro 111278

W. F. KRUIT

H. KUYT

JAC. LEM JR.

H. VAN LIER

J. VAN SCHEEPEN

H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADMINISTRATIE G. J. DEGENKAMP, POSTBUS 8002, AMSTERDAM-W

Renovigita Kontakto

Nia internacia kontakto jam estas renovigita. Korespondado kun alilandanoj jam estas ebla. El diversaj landoj jam atingas nin Esperantogazetoj; kaj ankaŭ kelkaj libroj el tie estas akireblaj, kvankam la monarango kun la eksterlandoj ankoraŭ embarasas nin.

Ĉiuj organizo kaj unuopulo jam komencis utiligi tiun kontakton por siaj celoj kaj interesoj. Tiun renovigitan kontakton ni deziras utiligi ankaŭ por afero, speciale interesanta nin, kiuj stude sin okupas pri gramatika, stila kaj vortara flankoj de Esperanto.

Nia lingvo evoluas, same kiel naciaj lingvoj. Sed ankaŭ same kiel ili ĝi evoluas ne nerimarkate, sed skuete, kvazaŭ saltete. Tiun fenomenon kaŭzas diversaj sociaj, ekonomiaj kaj aliaj okazaĵoj, forte influantaj la socian vivon. Precipe la vortarojn multe influas tiuj okazaĵoj. Post ĉiu epokfara okazaĵo, ĉiu revolucio en la mondokazado, ĉiu mondkatastrofo subite enkondukiĝas novaj vortoj, terminoj kaj esprimmanieroj. Ankaŭ la Esperantan vortaron, iasence eĉ la grammatikon, tio influas. Kaj por ne resti poste kompare al la naciaj lingvoj ni devas bone noti tiujn novaĵojn, ordigi, reguligi ilin, kaj forĵeti tion, kio ne konvenas en la kadro de nia lingva sistemo.

Por fari tion ni nepre bezonas internacian kontakton. Al efektiviĝo de tia kontakto ni deziras klopodi, petante kaj instigante alilandajn interesiĝantojn, precipe redakciojn interŝanĝi opiniojn pri ĉio, kio tuŝas la lingvan flankon de Esperanto.

Per nia artikoleto kaj vortlisto „Vortoj kaj esprimoj estiĝintaj pro la milito” ni jam iniciatis tiun ideon, kaj ni forte esperas, ke en eksterlandoj aŭdiĝos voĉoj por daŭrigi en tiu direkto, por ke en ĉiu duba afero decidu ne individuaj esperantistoj, sed la internacia lingva forumo.

Supozeble ankaŭ en aliaj landoj, suferintaj la malbenojn de l' milito, naskiĝis pluraj vortoj kaj esprimoj, eble alimaniere formitaj. Oni bonvolu nin informi pri tio! Kaj krome ni atentigas, ke ĉiulandaj aŭtoroj kaj redakcioj pli malpli influas la lingvouzadon en siaj respektivaj landoj. Pro la kelkara interrompo de internacia kontakto interŝanĝo de opinioj pri tio ne estis farebla. Jam antaŭ la milito ni sentis bezonon

Onze oefeningsrubrieken

Zoals we in het Januari no. hebben gezegd, lag het in onze bedoeling de uitwerking van elke opgave reeds in het onmiddellijk daarop volgende nummer te plaatsen. wetende, dat de lezers het op prijs stellen hun vertaling zo spoedig mogelijk daarmee te kunnen vergelijken. Daarom ook verzochten wij de vertalingen vóór de 25ste van elke maand in te zenden. In de praktijk bleek dit evenwel, voorlopig althans, niet mogelijk. Door de tegenwoordige omstandigheden kan de drukkerij er nog niet voor instaan het blad steeds precies op tijd af te kunnen leveren, zodat de lezers ons wel moeten verontschuldigen, als zij het enige dagen laten ontvangen. De tijd is dan echter te kort om de vertalingen in het volgende nummer op te nemen. Van nu af zullen wij de uitwerkingen daarom pas in het twee maanden daarop verschijnende nummer plaatsen. Dit geldt echter alleen voor de rubrieken van k-doj Van Scheepen en Kuyt. Men zende dus zijn vertalingen in vóór de 10de van de volgende maand; van dit nummer dus vóór 10 Maart enz.

Por Komencantoj

H. Kuyt

Opgave 2.

De onderwijzer schreef mij een lange brief over het gedrag van mijn zoon. 's Avonds verweet ik mijn zoon zijn onbehoorlijk gedrag. Hij beloofde zich voortaan beter te gedragen. Weet u reeds wat hij worden wil? Hij wil graag zeeman worden. Zij zag er zeer slecht uit, ondanks haar verblijf in de gezonde streek. De laatste tijd is zij zeer veel afgevallen, enkele jaren geleden woog zij zestig kilogram. Ik verzoek u mij wat brood te geven, ik heb honger. Tot mijn spijt heb ik zelfs geen kruimel brood in huis, ik heb alles opgegeten. Vertel, haar iets, waar zij om lachen kan, zij ziet er zo bedroefd uit. Door het ongeluk verloor hij alles wat hij bezat, nu heeft hij niets meer. Op de tentoonstelling zagen wij allerlei boeken: studieboeken, romans, gedichtenbundels, enz. Zo'n man, als hij, heb ik nodig. Altijd bleek hij een goed vakman te zijn. Hebt ge dat boek al gelezen? Hoe vond ge het? Heeft u dat schrift al gevonden? Hoe vond u het?

Vertaling van opgave 1.

La geonkloj1) jus revenis de ekskurso al la urbo Groningen. Ludante en2) la lernejo1), Petro falis; liaj3) dekstra kaj maldekstra brakoj3) rompiĝis4). Ambaŭ5) hundoj de la1) najbaro ne estas fidindaj6); la pli7) granda mordas ĉiun, kiun ĝi8) vidas. La1) patro ricevis de sia mastro belajn9) tason kaj subtason. Nia kato falis el la fenestro; ĝi8) estis tuj morta. La kanthoro „La nova tempo" festos morgaŭ sian10) dudek-jaran ekzistadon. La letero estis adresita al sinjoro11) Meijer, la sekretario de nia unuiĝo 12). La1) avo ĉiun dimanĉon13) vizitas nin; kiam li foriras. li salutas kun la vortoj: „Ĝis la14) revido!" La viro, kiun vi vidas tie, estas unu el15) miaj fratoj. „Ĝis revido!"16) la maristo salutis kaj

pri internacia prilingva revuo. Tiun bezonon ni nun sentas tiom pli forte. Kaj, kvankam nia studogazeto estas nur nacia eldonaĵo, ni tamen deziras kontribui laŭpove al internacia interkonsento pri ĉio, konceranta nian lingvon mem, pri ĝia unuforma evoluo kaj ĉie komprenebla riĉiĝo de ĝia vortaro.

foriris por nedifinita tempo al Ameriko. La tria volumo17) de „La Faraono” perdiĝis. Kvinona parto18) (de dudek kvin estas kvin. Kvardek dividita19) per dek estas kvar. Kvaroble kvin estas dudek.

In enkele gevallen wordt verwezen naar „La Komencanto” (L.K.).

1) Of: *la onklo kaj la onklino*; hier mag het lidwoord niet worden weggelaten, want het geldt een bepaalde oom en tante, nl. onze (zie: L.K., blz. 9). 2) Niet: *sur*. 3) Niet: *lia*, want het betreft twee armen, die braken. 4) Niet: *rompis*; men heeft hier te doen met een overgankelijk werkwoord, dat onovergankelijk gemaakt moet worden; dit doet men door middel van het achtervoegsel *iĝ* (zie: L.K. blz. 136). 5) Voor *ambaŭ* gebruikt men geen lidwoord. 6) Niet: *fideblaj*; de betekenis is: waard vertrouwd te worden. 7) Niet: *plej*; men heeft te doen met twee zelfstandigheden (zie: L.K., blz. 90). 8) Niet: *li*; hier is geen sprake van mannelijke of vrouwelijke wezens. 9) Niet *belan*; *tason kaj subtason* zijn twee zelfstandigheden. 10) Niet: *ĝian*; hier is sprake van bezit van het onderwerp (zie L.K., blz. 84). 11) Voor *heer, mevrouw* e.d. gebruikt men geen lidwoord. 12) Of: *societo*. 13) Of: *je ĉiu dimanĉo*; zonder voorzetsel is dit een rechtstreekse bepaling, dus met *n*. 14) Niet zonder *la*; het weerzien is bepaald. 15) Niet *de*. 16) Zonder *la*; het weerzien is onbepaald. 17) Niet: *parto* — deel, gedeelte van iets. 18) Niet: *kvin*; het betreft geen rangtelwoord, maar een breukgetal; ook *kvinono de*. 19. Of: *dividite per*.

Por progresantoj

J. van Scheepen

Opgave 3. Vertaal in Esperanto:

Een Duitse vertaling van een door een Amerikaan geschreven „politiek leven” van een groten Britsen staatsman doet ons niet sympathiek aan, maar als men weet, dat deze vertaling gedrukt is in Zwitserland en uitgegeven door een Zwitserse uitgeversmaatschappij, die een filiaal heeft in New-York, kan men er gunstiger over denken. En het is nu eenmaal zo, dat er in Zwitserland ook mensen zijn, die in hun taal op de hoogte dienen te worden gebracht van het wereldgebeuren. De Duitse vertaling is dus zeer wel gerechtvaardigd en in dit licht bezien willen wij ook gaarne melding maken van de verschijning van „Winston Churchill, ein politisches Lebensbild”, een voor deze tijd kloek uitgevoerd boek van meer dan 390 bladzijden.

Lewis Broad zegt zelf van dit boek, dat het is ontstaan uit zijn grote bewondering voor Churchill, hoewel de auteur aanvankelijk niet overtuigd was, dat W.C. zo'n groot staatsman was . . . Echter, zegt hij „door de triomf der feiten” heb ik mijn oordeel moeten herzien. Belangrijker getuigenis kan eigenlijk niet worden gegeven om te erkennen, dat hier een levensbeschrijving wordt gegeven van een man, die in de wereldgeschiedenis geboekstaafd zal blijven als de nuchtere staatsman, die in de ogenblikken waarin Engeland zijn grootste verliesslagen in ontvangst moest nemen, onwankelbaar bleef geloven in de uiteindelijke overwinning op de nazi-dictatuur en met dat geloof bezieling en leiding gaf aan zijn volk.

„Ned. Studieblad”.

Vertaling van opgave 1.

Se 1) vi sentas vin malĝoja 2) dum 3) akraj, mallumaj vintrotagoj antaŭ kaj post Kristnasko, tiam atentu 4) froste rigidiĝintan 5) merlon, kiu 6) kun suprenstarigitaj 7) plumoj vane serĉas vermojn en ŝtonmalmola tero 8). Kaj tiam ekfunkciigu

vian imagon 9) por aŭdi tiun saman merlon post du aŭ tri monatoj jubilanta 10) sian 11) sorĉantan kanton sur 12) la plej alta branĉeto de la fago antaŭ vi, kiu hodiaŭ 13) portas nur 14) neĝon sur nudaj branĉoj. Kaj samtempe konsciuj 15), ke ankaŭ en ĉi tio la homo superas la birdojn, ke li 16) por paroli per klasikaj terminoj 17) „povas kanti psalmojn en la nokto” 18). Ke tute certe 19) unu 20) homo pli, alia 20) malpli regas sian humoron 21), kiun kaŭzas 22) sezonoj, veterstato, okazoj en la hejmo 23) kaj ekster ĝi, sed ke li posedas la netakseblan kapablon 24) sin levi super ĉiujn ĉi tiujn influojn 25). Ne, certe ne por fuĝi 26) antaŭ la ĉiutaga vivo en revomondon 27), sed por akcepti ĉi tiun lastan 28) en la 29) pli alta realo, de kiu ĝi prenas siajn 30) sencon kaj signifon.

Ĉu estas ĝuste pro tio, ke ni travivas dimanĉon kvazaŭ specialan tagon 31)?

E. C. K.

La sono de afabla vorto resonas pli saĝe kaj pli longe ol la bruego 32) de kanonoj aŭ la voĉo de la tondro. (Noto Soeroto)

Sperto estas la vortaro de niaj eraroj.

Oni malofte pliboniĝos 33), se 34) oni havas nenian alian modelon por kopii krom 35) si mem.

1. Ambaŭ 36) filoj de mia najbaro estas malsanaj.
2. Unu el la plej grandaj riveroj en nia lando estas Rejno 37).
3. Sinjoro 38) Jansen havis hieraŭ akcidenton.
4. La onklino 39) verŝajne gastloĝos ĉe ni dum du tagoj.
5. Antaŭ la 25a de januaro 40) ni devos ensendi ĉiujn tradukojn.

1) *Mocht* geeft hier een mogelijkheid aan: als, indien. 2) Bepaling van gesteldheid. Het geeft de toestand aan van het onderwerp tijdens de werking; ook: *malgaja* en *deprimita*. 3) *En* = in de loop van; *dum* = gedurende. 4) *Atenti* = opletten; het woordje *op* wordt dus niet vertaald. Ook *eens* heeft geen betekenis; dus niet met *foje*. 5) Minder juist zijn: *malvarmigintan* en *pro malvarmo suferantan*. 6) Niet: *tiu*. *Die* is een betrekkelijk voornaamwoord en slaat op *merel*. 7) Niet: *vila* = ruig, behaard, harig; wel is te gebruiken *hirta* = ruig, met opstaande haren, ofschoon hier van veren sprake is. 8) Ook: *stone malmola*, *malmolega*. 9) Beter dan *eklaborigu*. 10) Bep. van gesteldheid, dus eerste naamval. 11) Het onderwerp is verborgen in het deelwoord *jubilanta*: ke *ĝi* (*la merlo*) jubilas *sian* kanton. 12) Het nederlandse voorzetsel *in* kan natuurlijk niet woordelijk vertaald worden. 13) Ook: *nuntempe*. 14) De bijwoorden krijgen nog al eens een verkeerde plaats; *nur* heeft betrekking op *neĝo* en moet dus direct daaraan vooraf gaan. 15) Een woordelijke vertaling is niet mogelijk, tenzij ten koste van de stijl: *kaj igu al vi samtempe tion vera*. 16) Hoewel strikt genomen de mens geen grammaticaal geslacht heeft, en dus met *ĝi* moet worden aangeduid, is deze vorm echter niet in gebruik. 17) Niet: *termo* = deel van wiskundige formule. 18) *Psalmkanti* is geen aan te bevelen samenstelling. 19) *Wis* versterkt de uitdrukking. Dit doen we dus ook in de vertaling. 20) Men bedoelt niet een bepaalden mens; vandaar, dat dus het lidwoord achterwege blijft. 21) Vrijer vertaald: *estas sklavo de sia animstato*. 22) Ook: *depende de* (niet: *al*), *sekve de*, *rezulte de*; niet: *influemas pro*; *influi*, dus eveneens *influemi*, heeft een actieve betekenis, wat hier niet bedoeld wordt. 23) Liever dan *domo*. De gebeurtenissen thuis. 24) Ook: *kapablecon*, maar zonder *ec* is het woord eveneens een abstract zelfst. naamw. 25) Richtings-n. 26) Het oudere *forkuri* wordt in deze betekenis niet meer gebruikt. Niet: *eskapi* = ergens aan ontsnappen. 27) Niet: *songomondon*; *songi* = dromen in de slaap. *Revi* = dromen in wakende toestand. 28) Tegenwoordig laat men dikwijls *tiu(n)* weg, dus: *ĉi lastan*. 29) Hier heeft *die* de betekenis van het lidwoord. 30) Slaat op twee zelfstandigheden. 31) *Kvazaŭ* is een voegwoord, geen voorzetsel. 32) Bulderen van geschut wordt meestal vertaald met *tondri*; dit woord komt echter al in de zin voor. 33) Ook: *oni malofte iĝos pli bona*. 34) Ook: *kiam*; *se* heeft echter tevens de betekenis van een veronderstelling een voorwaarde. 35) De betekenis van *dan* is *behalve*. 36) *Ambaŭ* is reeds bepaald en heeft geen lidwoord nodig. 37) Voor een eigenaam wordt het lidwoord niet vertaald. 38) Ook niet voor een titel. Hier volgt trouwens ook weer de eigenaam. 39) Het klassieke voorbeeld: *onze tante*, dus bepaald. 40) Namen van dagen en maanden hebben in Esperanto alleen dan een hoofdletter, als zij als eigenaam gebruikt worden, niet in een tijdsbepaling.

De komencanto al progresanto

Jac. Lem.

Opgave 2. Vertaal in Esperanto:

De neger.

Jacob en twee van zijn vrienden kwamen op een avond gezamenlijk aan een hotel in New-York om er de nacht door te brengen. Er was slechts één bed over (vert.: onbezet); dat was misschien voldoende voor twee reizigers, maar de derde zou zich dan met een armstoel moeten tevreden stellen. Een neger, die de verlegenheid van den hotelhouder en van de drie vrienden zag, bood aan zijn bed met een van hen te delen. Dit zo vriendelijk aangeboden offer werd door Jacob in dank aanvaard. Weldra ging hij naar bed, na een hotelknecht de opdracht te hebben gegeven (ordoni) hem om vijf uur in de morgen te wekken.

Toen hij was ingeslapen (vertaal: sliep), wilden zijn twee vrienden een grap uithalen. Zij namen wat roet en maakten zijn gezicht zwart, zodat het leek of er twee negers in het bed lagen.

Jacob werd op het door hem bepaalde uur gewekt. Toen hij voor de spiegel ging staan om zijn haar te kammen, zag hij zijn zwarte gelaat. „O!, o!”, riep hij uit, „daar heeft die stomme knecht zich vergist; hij heeft den neger gewekt.”

Fopperij (mistifikajo).

Een boer, die, dank zij het talent van een advocaat, zich uit een kwaad zaakje (malbona afero) had gered, beloofde aan zijn raadsman hem een haas te zenden.

Drie weken daarna ontmoette de advocaat zijn cliënt en vroeg hem, wanneer hij zijn belofte zou volbrengen.

„Wat! (kiel)”, riep de boer uit, „is de haas niet gekomen?”

„Neen.”

„Onbegrijpelijk; ik heb hem juist gisteren gestuurd.”

„Wat zegt u?”

„Ja, ik zag een haas in het bos lopen en ik heb hem toegeroepen: Gadedelijk naar mijnheer M., den advocaat, die en die straat (tiu strato aŭ alia), dat en dat nummer.”

Vertaling van opgave 1.

Savita per araneajo.

Iu reĝo, kiu perdis batalon (perdinta batalon; kiu estis venkita en batalo), estis persekutata de siaj malamikoj. Li fuĝis en groton (kavernon), kies enirejo estis tre mallarĝa. La sekvintan tagon liaj malamikoj rekomencis la persekut(ad)on, kaj venis ĝis antaŭ la groto. Unu el la soldatoj ekvidis la groton kaj diris: „Ni traserĉu tiun ĉi groton.”

„Tio estus tute senutila”, diris la aliaj. „Rigardu tiun araneaĵon, kiu pendas antaŭ la enirejo. Se la reĝo sin estus kaŝinta tie, tiu araneajo sendube estus ruinigita.”

Kaj ili foriris.

La araneo, kiu komencis la teksadon de sia reto en la momento, kiam la reĝo fuĝis en la groton, estis fininta ĝin antaŭ ol la soldatoj preteriris. Danke al ĉi tiu cirkonstanco la reĝo povis rifuĝi al alia lando.

Handleiding bij het vertalen

F. Faulhaber.

Het juiste woord I.

Vergelijken we de volgende zinnen:

1. De vrouw had haar metgezel alleen gelaten, toen hij was gevallen in het donkere bos.

2. De dief had zijn metgezel alleen gelaten, toen hij was gevallen in het donkere bos.

We zullen dan vinden, dat de eerste aan duidelijkheid niets te wensen overlaat, terwijl we bij de laatste misschien even het voorhoofd zullen fronsen: wie was gevallen in het donkere bos: de dief of zijn metgezel?

Deze twijfel ontstaat, doordat de woorden *dief* en *metgezel*, die tot hetzelfde geslacht behoren, in de bijzin worden aangeduid door het persoonlijk voornaamwoord *hij*, dat zowel op *dief* als op zijn *metgezel* kan slaan. In de eerste zin is dit misverstand uitgesloten, daar hij alleen op *haar metgezel* betrekking heeft.

Men voorkomt misverstand in zinnen als no. 2, door in plaats van het persoonlijk voornaamwoord *hij* het aanwijzend voornaamwoord *deze* of *dit* te gebruiken.

3. De dief had zijn metgezel alleen gelaten, toen *deze* was gevallen in het donkere bos.

Deze slaat dan op den laatstgenoemde, *zijn metgezel*.

In Esperanto vertaald:

La ŝtelisto lasis sian kunulon sola, kiam ĉi tiu estis falinta en la malluma arbaro. Nu zij men in zulke gevallen bij het vertalen voorzichtig, daar het geslacht van een nederlands woord niet altijd gelijk is aan dat van het overeenkomstige woord in Esperanto, waardoor *deze* en *dit* niet altijd met *tiu(j)* ĉi, doch ook wel eens met *li*, *ŝi*, *ĝi* of *ili* vertaald moet worden, b.v.:

4. Jaĉjo klinis sin super la sitelon — tiu ĉi renversiĝis; vertaling van: Jaap dook over de emmer — *deze* rolde om. *Jaap* en *emmer* zijn beide mannelijk, dus is *deze* hier gerechtvaardigd. Stond er: hij rolde om, dan kon men zich afvragen: rolde Jaap om of de emmer? In Esperanto is misverstand uitgesloten, want *Jaĉjo* is *li*, *sitelo* — *ĝi*, dus moeten we vertalen: Jaĉjo klinis sin super la sitelon — *ĝi* renversiĝis.

5. La vojaĝo daŭris al ŝi tre longe kaj pro malpacienco ŝi jam saltis el la tramo antaŭ ol ĉi tiu haltis; vertaling van: De reis duurde haar erg lang en van ongeduld sprong ze al uit de tram voor *deze* stilstond. *Zij* en *tram* zijn beide vrouwelijk, dus: voor *deze* stilstond. In Esperanto echter: antaŭ ol *ĝi* haltis.

6. Si venis antaŭ fermita pordo kaj frapis. Tuj ĉi tiu malfermiĝis. Dit moet zijn: Tuj *ĝi* malfermiĝis.

Soms is het gebruik van *deze* of *dit* ook in het Nederlands niet gemotiveerd, b.v.:

7. Zij gaf haar man zo'n hevige slag op het hoofd, dat *deze* schreeuwend op de grond viel, hetgeen vertaald werd met: Si donis al sia edzo tiom fortan frapon sur la kapon, ke ĉi tiu kriegante terenfalas. Dit moet zijn: ke *li* kriegante terenfalas; ook in de nederlandse zin kan *hij* inplaats van *deze* geen misverstand veroorzaken. De ongecorrigeerde Esperanto-vertaling laat echter een ander misverstand toe: ke ĉi tiu (= la kapo) kriegante terenfalas!

8. Armande pri tio parolis kun siaj gepatroj kaj ĉi tiuj konsentis. Dit moet zijn: kaj *ili* konsentis.

9. Si levis sian pistolon, premis la klikon, kaj densa griza nuboj ekestis ĉirkaŭ la viro, ĉi tiun envolvis en nebulo, kiu duone pleniĝis la ĉambro. Dit moet zijn: *lin* volvis en nebulo.

Deze en *dit* en het overeenkomstige *tiu ĉi* worden slechts gebruikt in geval van noodzakelijkheid. Wat echter in het Nederlands noodzakelijk is, is niet altijd noodzakelijk in Esperanto.

Vortoj kaj esprimoj el milita tempo

(Daŭrigo)

agresie — atakemo, militemo
atoombom — atombombo
bominslag — bombotrafo
brandbom — brulbombo,
bruliga bombo
brisantbom — eksplodbombo
bunker — bunkero *)
camouflage — kamuflaĵo *)
camoufleren — kamuflaĵi *)
clandestien — neleĝe
corridor — koridoro
cultuurkamer — kulturgildo
distributie — distribu(ad)o
distributie-bescheiden —
distribuaĵ dokumentoj
eenheidsorganisatie — unueca organizo
eenheidsvakbeweging —
unueca sindikato
egelstelling — erinaca pozicio
elastisch — elasta
fascist — faŝisto
fietsband — pneŭmatiko, bicikla tubo
— houten — ligna radrando
— massieve — masiva radrando
geallieerden — aliancanoj
Generaal-Gouvernement —
Pola Gubernio
gezagstroepen — policaj trupoj
Groot-Duitsland — Grand-Germanio
guerilla-oorlog — gverilo *)
inlegveld — kontrola matrikulo
jodenvervolgning — judopersekutado,
pogromo *)
jodenster — juda stelo
klantenbinding — ligado de klientoj
kring — kvartalrondo
kringhuis — kvartalhejmo, rondohejmo
luchtbescherming —
kontraŭaviadila defendo
luchtbeschermingsdienst —
kontraŭaviadila servo
luchtdoelartillerie —
kontraŭaviadila artilerio

*) Ne troviĝas en „Plena Vortaro”.

Volonte la redakcio akceptos kritikon aŭ laŭpete klarigos al alilandanoj nesufiĉe klarajn tradukojn aŭ la signifon de nederlanda vorto.

De kelkaj legantoj ni jam ricevis interesan kritikon koncerne kelke da vortoj en la unua listo. Post finiĝo de la tuta listo ni traktos ĉiujn ricevitajn rimarkojn.

mijn — mino

mijnenveger — mindetrua ŝipo

mortier — bombokanono

noodkaart —

provizora distribua kupono
omsingelen — ĉirkaŭi, blok(ad)i

onderduiken — sinkaŝi, subplankiĝi,
subakviĝi, foriĝi

onderduiker — sinkaŝinto, subplanki-
ĝinto, subakviĝinto, foriĝinto, forulo

ondergronds — kaŝe, neleĝe, subtere

opblazen — eksplodigi

partisaan — partizano *)

penetratie — penetraĵo

persoonsbewijs — legitimilo,

identecatesto
politieke betrouwbaarheid —

politika fidindeco

protector — protektoratestro

raketbom — rakedbombo

rantsoenbon — porciuma kupono

repatriëren — repatriigi (-iĝi)

sadist — sadisto

staat van beleg — sieĝostato

superfort — fluganta fortikaĵo

Tommy — Tomo

tonnage — tunaro

uitdeelpost — disdonejo, disdividejo

unfair — malsincera

vazalstaat — vasalŝtato

verbroederen — interfratiĝi

V 1 (vergelding) — Venĝo Ia

vergunning — permes(il)o

vesting Europa — fortikaĵo Eŭropo

victorie — venko

vliegend fort — fluganta fortikaĵo

vorderen — rekvizicii

wachtman — nacia gardisto

weermacht — militistaro

winterhulp — (por)vintra helpo,

-subteno

zwarthemd — nigraĉemizulo

(Daŭrigota)

Libroservo F. L. E.

Postbus 8002, Amsterdam-W.

EIGENNAMEN Prijs f 0.35

Een studie over het vertalen van persoonsnamen, geografische-, planten- en dierennamen, namen van hemellichamen, straten, gebouwen, enz.

Esperanto en Nederlando

G. P. de Bruin

Kiam en septembro 1939a la latentia militstato en Eŭropo transiris en akutan, tio tre malfavore influis nian movadon. La ĝistiamaj regula kresko de la Federacio fariĝis malkresko: ĝi perdis en tiu jaro 702 membrojn. Pro la mobilizo multaj aktivuloj devis forlasi sian postenon; aliflanke la homoj okupis sin pri aliaj, problemoj ol lernado de internacia lingvo. El tio sekvis, ke estas malpli da lernantoj, vendiĝas malpli da lernolibroj kaj malpliĝas la federaciaj enspezoj.

Kiam en majo 1940a la germanoj okupis nian landon, la kondiĉoj por nia movado kompreneble ankoraŭ plimalboniĝis. Malgrau tio la Federaci-Estraro decidis daŭrigi la laboron tiom longe, kiom tio eblis sen domaĝo al nia ideo. Ĝi informis pri tio la sekciojn kaj poste ankoraŭ okazigis en kelkaj partoj de la lando kunvenojn, kie estrarano priparolis la aferstaton kun aktivuloj el sekcioj kaj distriktoj. La Federaci-Estraro klarigis tie sian starpunkton kaj deklaris i.a., ke ĝi ne akceptos libervole ian kontrolon de la regantoj. Se okazus tia kontrolo, la membroj ne atentu la eventuale devige eldiritajn parolojn, sed forlasu la Federacion. Por sekurigi sian monon la sekcioj sendu ĝin al la Libroservo, kiu siavice tuj uzos ĝin por pagi siajn kreditorojn.

Dume malpliboniĝis la financa situacio. En 1940a la membroperdo estis 2289! Necesis likvidi la oficejon, eksigi la pagitan oficiston, malpliigi la amplekson de la gazeto. Oni aperigis ankoraŭ duan Romanserion, sed ĝia lasta volumo ne plu povis eliri. . . . La 21an de marto 1941a la estraranoj de ĉiuj lokaj, regionaj kaj landaj Esperanto-organizoj estis vizitataj de policianoj aŭ devis veni en la policejon kaj ricevis la komunikon, ke de tiam ĉiu Esperanto-agado estas malpermesita kaj ĉiuj posedaĵoj de la organizoj konfiskataj.

Kvankam oni jam antaŭtimis tion ĉi, ĝi tamen okazis ankoraŭ surprize. Kelkaj sekcioj jam antaŭe likvidiĝis; aliaj faris „duoblan” librotendon, por ke eventuale la malamiko ne riĉiĝu per ilia mono. Iu distrikto investis sian monon en libroj kaj havis la bonŝancon post la militfino reakiri ilin. Ĉe iu sekcio oni konfiskis la meblojn k.t.p., sed forĝesis la bibliotekon.

La Federaci-Estraro perdis kontorbezonojn kaj kvanton da mono, sed feliĉe oni ne faris esploron pri la Libroservo. Ĝia materialo konserviĝis diversloke — grava materia kaj spirita profito por nia organizo. Ankaŭ la ĵus finpresitaj foliegoj de la lasta volumo de la Romanserio „subakviĝis”, kaj pro tio la Federacio povis jam baldaŭ post sia restariĝo anonci la aperon de „La Perfido”, de A. M. de Jong. Malgrau likvido kaj malpermeso oni diversloke konservis la kontakton. La Federaci-Estraro pli malpli regule kunvenis por priparoli la necesajn paŝojn, tuj farotajn post finiĝo de l' milito. Malgrandaj grupetoj kunvenis private ĉe iu membro hejme; kelkloke oni eĉ instruis iujn; okazis eĉ modestaj Zamenhofaj vesperoj. Funkciuloj diverslokaj letere interrilatis, utiligis la devigitan senokupitecon por traduki aŭ verki, k.t.p. En Hago iu kamarado, „subakviĝinta” pro sia judeco, lernis nian lingvon en 1943a, kaj poste instruis ĝin al seso da junuloj, el kiuj kelkaj finlernis la lingvon. En Ooltgensplaat provizora instruisto en 1942a povis, kun permeso de la naci-socialista komunumestro, instrui Esperanton al infanoj de la elementa lernejo. En la lasta militjaro, kiam mankis fajro kaj lumo, kiam estis malpermesite esti surstrate en vesperaj horoj, kaj poste kiam en parto de la lando mankis ankaŭ nutraĵoj, la sekreta agado preskaŭ malebliĝis. Sed fine venis la liberiĝo; la alvoko de la Federaci-Estraro, presita dum la okupiteco, estis tuj forsendata al ĉiuj malnovaj adresoj, kaj la movado tuj vekigis el sia letargio.

Kamaradoj, kiuj scias interesajn okazaĵojn el la milita tempo, sendu ilin al mia adreso: Preangerstraat 35, Enschede.

Vi demandu - Ni respondos

Welke vertaling verdient de voorkeur voor *mond* (riviermond), het logische *el-fluejo* of het meer gebruikelijke *enfluejo*, dat met de logica in strijd is, omdat de rivier daar in de zee stroomt, dus *uitstroomt*?

Eigenlijk zijn beide vertalingen juist, want het water stroomt zowel *uit* de rivier als *in* de zee. Toch geven we de voorkeur aan *elfluejo*, omdat bedoeld wordt de monding van de rivier zelf, die daar dus *uitstroomt* en niet de monding als onderdeel van de zee, waarin het water stroomt.